


LA PONTO

Tweemaandelijks tijdschrift van de Limburgse Esperantovereniging.



Jaargang 2, nummer 6 (12), maart-april 2010

Verschijnt op de eerste dag van iedere onpare maand.

Erkenningsnummer: P808228

V.U.: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel

Tel. 011-73.20.47 – E-mail: pieter-jan.doumen@telenet.be

LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)
Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.
Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato
Jarkolekto 2, n-ro 6 (12): marto-aprilo 2010
Ĉiuj antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas.
Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47
Retadreso: pieter-jan.doumen@telenet.be

Redaktore

Karaj Gelegantoj,

La ĉi-jara vintro ŝajnis voli kompensi nin por la mildaj vintroj de la lastaj jaroj. Mi memoras, ke ankaŭ ĉi-jare la veterprofetoj antaŭdiris mildan vintron, pensante pri la varmigo de la tero, sed ili eraris....

Kiel vi povas konstati, mi denove havas novan retadreson. Jam preskaŭ de du monatoj mi ne plu povis ricevi kaj sendi retmesaĝojn aŭ konsulti la interreton, sur kiu aperis mesaĝo de Full Telecom, ke Xhost, la firmao de kiu dependas la provizanto adsl4you, ne plu pagas la fakturojn de Full Telecom, kiu, pro tiu kaŭzo, malkonektis ĉiujn adsl-ligojn de Xhost, do ankaŭ la mian. La kaŭzo de la konflikto estas financa kompensaĵo, kiun Xhost postulas de Full Telecom, kiu rifuzas pagi. Tial adsl4you liberigis min de ĉiuj devigoj kaj konsilis min serĉi alian provizanton... Se do kelkaj el vi sendis al mi retmesaĝon kaj ne ricevis respondon: jen la kaŭzo. Mi petas vin ekskuzi min pro tiu malkomfortaĵo kaj resendi al mi vian mesaĝon, se ĝi ankoraŭ aktualas. Pro tiu kaŭzo vi ankoraŭ ne plu trovas reklamon de adsl4you en nia revuo. Estas interese scii, ke ĝuste nun du deputitoj preparas leĝproponon, kiu devigos ĉiujn provizantojn garantii retaliron al ret-uzantaj klientoj dum ses monatoj post nuligo de la kontrakto. Ŝajne mi ne estas la sola viktimo de tiu arbitra traktado...

Pieter Jan Doumen

Letero de D-ro L.L. Zamenhof al Nikolaj A. Borovko (1895) (fino) *(Brief van Dr. L.L. Zamenhof aan Nikolaj Afrikanovitsj Borovko (1895) (slot))*

Dum ses jaroj mi laboris perfektigante kaj provante la lingvon, – kaj mi havis sufiĉe da laboro, kvankam en la jaro 1878 al mi ŝajnis,

ke la lingvo jam estas tute preta. Mi multe tradukis en mian lingvon, skribis en ĝi verkojn originalajn, kaj vastaj provoj montris al mi, ke tio, kio ŝajnis al mi tute preta teorie, estis ankoraŭ ne preta praktike. Multon mi devis ĉirkaŭhaki, anstataŭigi, korekti kaj radike transformi. Vortoj kaj formoj, principoj kaj postuloj puŝis kaj malhelpis unuj la aliajn, dume en la teorio, ĉio aparte, kaj en mallongaj provoj, ili ŝajnis al mi tute bonaj. Tiaj elementoj, kiel ekz-e la universala prepozicio “je”, la elasta verbo “meti”, la neŭtrala, sed definitiva finiĝo “-aŭ” k.t.p. kredeble neniam enfalus en mian kapon teorie. Kelkaj formoj, kiuj ŝajnis al mi riĉaĵo, montriĝis nun en la praktiko senbezona balasto; tiel ekz-e mi devis forĵeti kelkajn nebezonaĵajn sufiksojn. En la jaro 1887 al mi ŝajnis, ke estas sufiĉe por la lingvo havi



D-ro L. L. Zamenhof kaj Klara Zilbernick

gramatikon kaj vortaron; la multepezecon kaj malgraciecon de la lingvo mi atribudis nur al tio, ke mi ankoraŭ ne sufiĉe bone ĝin posedas; sed la praktiko ĉiam pli kaj pli konvinkadis min, ke la lingvo bezonas ankoraŭ ian nekapteblan “ion”, la kunligantan elementon, donantan al la lingvo vivon kaj difinitan, tute formitan “spiriton”. (La nesciado de la spirito de la lingvo estas la kaŭzo, kial kelkaj Esperantistoj, tre malmulte legintaj en la lingvo Esperanto, skribas senerare, sed en multepeza, malagrabla stilo, dum la pli spertaj Esperantistoj skribas en bona kaj tute egala stilo, al kiu ajn nacio ili apartenas. La spirito de la lingvo sendube kun la tempo multe, kvankam iom post iom kaj nerimarikite, ŝanĝiĝos; sed se la unuaj Esperantistoj, homoj de diversaj nacioj, ne renkontus en la lingvo tute difinitan fundamentan spiriton, ĉiu komencus tiri ĝin al sia flankon, kaj la lingvo restus eterne, aŭ almenaŭ dum tre

longa tempo, malgracia kaj senviva kolekto da vortoj.) – Mi komencis tiam evitadi laŭvortajn tradukojn el tiu aŭ alia lingvo kaj penis rekte pensi en la lingvo neŭtrala. Poste mi rimarkis,



ke la lingvo en miaj manoj ĉesas jam esti senfundamenta ombro de tiu aŭ alia lingvo, kun kiu mi havas aferon en tiu aŭ alia momento, kaj ke ĝi ricevas sian propran spiriton, sian propran vivon, sian propran difinitan kaj klare esprimitan fizionomion, ne dependantan jam de iaj influoj. La parolo fluis jam mem, flekseble, gracie kaj tute libere, kiel la viva gepatra lingvo.

Ankoraŭ unu cirkonstanco igis min por longa tempo prokrasti mian publikan eliron kun la lingvo: dum longa tempo restis nesolvita unu problemo, kiu havas grandegan signifon por neŭtrala lingvo. Mi scias, ke ĉiu diros al mi: “Via lingvo estos por mi utila nur tiam, kiam la tuta mondo ĝin akceptos; tial mi ne povos ĝin akcepti ĝis tiam, kiam ĝin akceptos la tuta mondo”. Sed ĉar la “mondo” ne estas ebla sen antaŭaj apartaj “unuoj”, la neŭtrala lingvo ne povis havi estontecon ĝis tiam, kiam ĝia utileco fariĝos por ĉiu aparta persono sendependa de tio, ĉu la lingvo jam estas akceptita de la mondo aŭ ne. Pri tiu ĉi problemo mi longe pensadis. Fine la tiel nomataj sekretaj alfabetoj, kiuj ne postulas, ke la mondo antaŭe ilin akceptu, kaj donas al tute ne inicita adresato la eblon kompreni ĉion skribitan de vi, se vi nur transdonas al la adresato la ŝlosilon, – alkondukis min al la penso aranĝi ankaŭ la lingvon en la maniero de tia “ŝlosilo”, kiu, enhavante en si ne sole la tutan vortaron, sed ankaŭ la tutan gramatikon en la formo de apartaj, tute memstaraj kaj alfabeto ordigitaj elementoj, donus la eblon al la tute ne inicita adresato de ia ajn nacio tuj kompreni vian leteron.

Mi finis la universitaton kaj komencis mian medicinan praktikon. Nun mi komencis jam pensi pri la publika eliro de mia libro. Mi pretigis la manuskripton de mia unua broŝuro (“D-ro Esperanto. Lingvo Internacia. Antaŭparolo kaj plena lernolibro”), kaj komencis serĉadi eldonanton. Sed tie ĉi mi la unuan fojon renkontis la maldolĉan praktikon de la vivo, la financan demandon, kun kiu mi poste ankoraŭ multe devis kaj devas forte batali. Dum du jaroj mi vane serĉis eldonanton. Kiam mi jam trovis unu, li dum duonjaro pretigadis mian briŝuron por eldono kaj fine – rifuzis. Fine, post longaj klopodoj, mi sukcesis mem eldoni mian unuan broŝuron en julio de la jaro 1887. Mi estis tre ekscitita antaŭ tio ĉi; mi sentis, ke mi staras antaŭ Rubikono, kaj de la tago, kiam aperos mia broŝuro, mi jam ne havos la eblon reiri; mi sciis, kia sorto atendas kuraciston, kiu dependas de la publiko, se tiu ĉi publiko vidas en li fantaziulon, homon, kiu sin okupas per “flankaj aferoj”; mi sentis, ke mi metas sur la karton la tutajn estontajn trankvilecon kaj ekzistadon miajn kaj de mia familio; sed mi ne povis forlasi la ideon, kiu eniris mian korpon kaj sangon, kaj ... mi transiris Rubikonon.

D-ro L.L. Zamenhof

La Flandra Esperanto-Ligo
invitas ĉiujn esperantistojn al la
Beneluxa Esperanto-Kongreso
de la 13-a ĝis la 16-a de majo 2010
en Antverpeno.

Temo: “*Lingva prismo de Beneluxo*”

Programo:

- prelegoj de i.a. Istvan Ertle, Alain Dawson
- prelego pri 50 jaroj da Beneluxo
- popola balo kun la Esperanto-grupo *Kapriol'*
- ekskursoj al malpli turismaj lokoj
- julbileo de la Movado sen Nomo

Tranoktado eblas en:

- du gastejoj sufiĉe proksimaj al la Esperanto-centro
- unu sufiĉe luksa hotelo por € 35 nokte kaj unu malpli luksa po € 13 nokte

Petu informojn ĉe:

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei

2000 Antverpeno
Tel. +32(0)3.234.34.00
sekretario@fel.esperanto.be

Poezio: La vivo de Promoteo (1)

(Poezie: Het leven van Prometheus (1))

La epopea ĝenro ankoraŭ ne mortis. Dum la zagreba UK mi aĉetis libron kun la titolo "La vivo de Prometeo" de B. Tornado. La verkisto, la ruso Boris Vladimiroviĉ Tokarev, verkis ĝin rekte en Esperanto kaj aperigis ĝin en 1996 ĉe Impeto en Moskvo.

Ne temas pri la greka duondio Prometheus, sed pri simila heroo, kiu vivis en la ŝtonepoko. La poemo, 9.294 regulritmaj versoj kun rimoj, estas tre interesa laŭenhave kaj bone legebla.

Komence de la poemo la patrino de Peo, la juna knabino Ija, trovas fremdulon en la arbaro, post kiam fajro detruis la vilaĝon. La supervivantoj de la katastrofo malsatas.

Mankas iloj por ĉasado,
en l'arbar' aperis padoj.
Jen oranĝo, jen migdalo,
jen ĉerizo, jen okzalo.
Estas tre acidaj pomoj,
sed satiĝas lacaj homoj.
Jen filin' de Rao – Ija,
iras kun movad' gracia.
Sur figarbo fruktoj pendas,
ŝajnas, ke nur ŝin atendas.
Ŝi tuj voku la aliajn,
ĉiuj ŝiru fiĝojn siajn!

Oj! Pikegas ŝin kratago,
ne singardis ŝia ago.
Aj! Post la kratago – homo...
Sed ne nia... Ne, moviĝas.
Fremda homo! Nu, sufiĉas.
Ŝi pretiĝis al forkuro –
"Jen cikatro sur la kruro –
do vundita; jen la kapo...
Kiom stulta estas gapo!"
Ŝin malhelpas iom branĉoj,
sur la frunto estas tranĉoj...
signoj de la gento Lo'!
Ŝi forkuru, estas tro.
Sammomente la rigardo
de l' vundito kun la ardo
de malsato ŝin renkontis.
Ŝi ruĝiĝis kaj ekhontis,
kaj indigne levis sin –
"Li impertinentas min
en la okulojn alrigardi!
Nu, mi scias ja min gardi,
kaj respondos sen panik'!"
Kaj al kapo flugis fig'!
Tuj ĝin kaptis la vundito
kaj ekmanĝis kun avido,
ĝemetante pro la vund'.
Ŝi rigardis dum sekund',
Kaj forkuris. Figoj restis,
nerabite plu majestis.
*Nokte Ija ne povas dormi.
Matene ŝi reiras al la vundito.*
Jen li estas. Post kratago
ankaŭ dum ĉi tiu tago
kuŝas la vundita hom'.
Jen al li tri figoj, pom'...
Certe trinki li deziras.
Ija tuj al fonto iras,
sed ekhaltas ŝi kun ĝem' –
estas tamen ja problem':
fonton ŝi de lok' ne movos,
kiel akvon porti povos?
En la manoj? Ŝi kelkfoje
provis porti, sed dumvoje
l'akvo defluiĝis vane,
restis nur malsek' surmane.
Sed, se porti ĝin... enbuŝe?
Tamen porti ĝin senuje
preskaŭ estas perdi tuje!
Kuras ŝi kun plena buŝ',
sed – hezitas antaŭ tuŝ'.
L'akvo fluis for – domaĝe!
Ĉu ageblas pli malsaĝe?
Ĉu... sur fremda viro kuŝe
ŝi premiĝu buŝ-al-buŝe?
Sed alie velkos li,

same kiel fagfoli'...
 Ŝi denove – al la fonto,
 post reveno tuj sen honto
 ŝi trinkigas lin el buŝ'.
 Estis tre agrabla tuŝ'!
 Li vigliĝis, kvazaŭ vivo
 tuj revenis kun salivo
 de l' helpema junulin'.
 Vere, ŝi vivigis lin!
 Same ŝi al font' rapidas,
 ĉar l'efikon ŝi jam vidas:
 kia ŝang' en lia stat'!
 Ŝi trinkigas lin ĝis sat'.
 Pli facile li jam spiris,
 Ŝi – de l'arbo frunktojn ŝiris,
 lasis multajn apud li;
 poste – kiel papili' –
 tuj forkuris. Sekvatage
 ŝi denove iris vage
 tra l'arbaron en solec'.
 Kia granda sanprogres'!
 Sidas sur la ter' fremdulo,
 plene viglas la okuloj,
 al la akvo grimpis mem –
 montras de la spuroj ĉen'.

(*Daŭrigota*)



Novajoj el Esperantolando

(*Nieuws uit Esperantoland*)

Nederlando 1. – *Miloj da eŭroj fraŭditaj* –

Miloj da eŭroj senspure malaperis el la bankkonto de la Internacia Esperanto-Instituto (IEI) en Hago. La estraro de IEI longe ne konsciis pri la liko en la konto, ĉar al ĝi estis prezentataj falsaj kont-eltiroj. Rerezentantoj de IEI ne respondas al mesaĝoj pri la asertata fraŭdo. Same ne respondas demandojn Atilio Orellana Rojas, la direktoro de IEI, kiu estis urĝe devi-

gita forlasi sian postenon kaj sian loĝejon en la konstruaĵo de IEI.

IEI estas malnova kaj finance solida institucio fondita en 1930 de Andreo Cseh, la aŭtoro de la Cseh-metodo por la instruado de Esperanto, kaj de la gesinjoroj Isbrücker. La likado de mono povis daŭri relative longan tempon ĝis komence de oktobro 2009, kiam unu el la estraranoj decidis kontroli la bonhaston de la konto memstare. Tiam evidentiĝis, ke iu kun aliro al la ŝlosilvortoj de la reta banko misuzis sian pozicion kaj elprenis plurajn milojn da eŭroj el la kapitalo de IEI.

(*Eventoj, Hungario*)

Nederlando 2. – *Tri filmitaj prelegoj de Ivo Lapenna en la reto* – La Reta Kinejo de UEA proponas tri filmojn, kiuj konatigas la vivon de prof. Ivo Lapenna. Temas pri la prelegoj, kiujn prof. Carlo Minnaja kaj prof. Duncan Charters faris dum la Malferma Tago de la Centra Oficejo la 28-an de novembro pri siaj kontaktoj kaj renkontiĝoj kun Lapenna.

Carlo Minnaja, prezidanto de la Internacia Instituto Ivo Lapenna, faris sian prelegon en du partoj, kiuj ambaŭ daŭras iom pli ol 50 minutojn. Duncan Charters, vicprezidanto de ILEI, elstarigis en sia 30-minuta prelego la kontribuon de Lapenna al la antaŭenigo de la lerneja instruado de Esperanto kaj por seriozigi la informadon kaj dokumentadon pri Esperanto. Interesa komunikaĵo de la prelegantoj estas, ke ili iam venkis en la Oratora Konkurso de UEA, kaj sekve iliaj nomoj estis gravuritaj sur la Pokalo Ivo Lapenna.

(*Eventoj, Hungario*)

Brazilo – *Bona ŝanco pro Esperanto* –

Preparante sin al du mondaj eventoj okazontaj en Brazilo en 2014 kaj 2016, nome la monda futbala ĉampioneco kaj Olimpikoj, kaj ankaŭ por alporti plian modernigon de Brazilo, la brazila registaro ekkonstruos en 2010 fervojon por supertrajno (kugla trajno), kiu atingos 350 km hore kaj iros de Rio de Janeiro ĝis Campinas, pasante tra Sao Paulo, trakurante distancon de 380 km. La brazila ŝtato investos 23 miliardojn da usonaj dolaroj por tiu projekto.

Ni, esperantistoj, petas, ke ĉiuj informtabuloj de tiu tuta fervoja projekto prezentu informojn ankaŭ en Esperanto. Tio eblos, ĉar la popularega prezidanto Luis Inacio Lula da Silva jam oficiale montris sin favora al Esperanto antaŭ nelonge, kaj la brazila senato ĵus aprobis leĝon, kiu permesas la instruadon de Esperanto en

ĉiuj brazilaj mezgradaj lernejoj.

Juscelino Gama, Brazilo

Belgio. – *La angla lingvo en Belgio* –

Oni povus diri, ke la flandra lingvo (nederlanda parolata en Belgio) ne plu ekzistas en muziko. La kulturo estas reduktata al nur unu lingvo: la angla. Kvazaŭ ĉiuj nomoj de butikoj kaj komercaj produktoj estas en la angla. Pli kaj pli da vortoj entrudiĝas en nian ĉiutagan lingvon en reklamoj, en gazetoj kaj en oficialaj radioj kaj televidstacioj.

Niaj posteuloj ne plu estas “kinderen” (infanoj) sed “kids”¹. Intervuoj kun anglalingvanoj estas oftaj kaj ĉiam malpli tradukataj. Kvazaŭ ĉiuj filmoj en televido estas anglalingvaj (en la flandra televido ili estas subtekstigitaj). Nur treege escepte ni povas spekti filmon en lingvo alia ol la angla.

Reklamoj en nia flandra televido senhonte alparolas nin en la angla. Entreprenoj, kiuj kredas sin internaciaj, deklaras la anglan kiel sian “oficialan entreprenan lingvon” kaj devigas siajn dungitojn uzi tiun lingvon eĉ inter si ... kontraŭleĝe.

Niaj identigaj kartoj montras en sia titolo la 3 oficialajn belgajn lingvojn – la nederlanda, la franca kaj la germana – sed krome ankaŭ la anglan: BELGIE BELGIQUE BELGIEN BELGIUM. Plue sur la karto estas nur la denaska lingvo (ĉe mi la nederlanda) kaj ... la angla. Ekzemple: naam / name.

Tiuj identigaj kartoj jam antaŭ 20 jaroj estis kondamnitaj de la Ŝtata Konsilio (la plej alta jura instanco) pro kontraŭleĝeco. La tiamaj ministroj decidis ne anstataŭigi la ĵus eldonitajn dokumentojn, ĉar la kostoj estus tro altaj. Ili promesis, ke ĉe nova eldono ili enordigos la aferon. Intertempe ni jam devis aĉeti du novajn kartojn (la lasta enhavas elektronikan cirkvitaron!) same kontraŭleĝajn pro la uzo de la angla.

Leo de Cooman

Remembris ĉe FEL kaj LEA!

Se vi ankoraŭ ne renovigis vian membrecon ĉe FEL kaj LEA, la tempo urĝas fari tion, ĉar du monatoj de la nova jaro jam pasis, kaj, kiel vi scias, ili ne povas daŭrigi sian agadon por Esperanto sen via subteno.

La kotizo por la membreco ĉe FEL estas € 25 jare kaj inkluzivas la abonon de ĝia dumonata revuo *Horizon-taal* kaj la membrecon ĉe LEA.

Se vi deziras nur membriĝi ĉe LEA,
via kontribuo estos € 12,50.
Vi ankaŭ ricevos senpage
la revueton de LEA *La Ponto*.
La bankkonto de LEA: 735-0190144-12.

Usono 1. – *La plej bela surprizo de 2010* –

Paula, kiu vivas kun sia edzo en Lake Elsinore, Kalifornio (Usono), aparte brile eniris la mondon de Esperanto. Ŝi lernis nian lingvon ekde aŭgusto 2009 kaj jam unu monaton poste, por ekzerci sin, ŝi komencis konstrui personan dulingvan blogon

<http://paulaesperanto.wordpress.com/> .

“La lingvo estas tiel bela kaj facila, ke mi rapide lernas ĝin. Mi uzas la lingvon ĉiutage”, ŝi skribis. Esperanto aldoniĝas al ŝiaj aliaj pasioj: kudrado, trikado, kroĉetado, brodado, en kio ŝi montras sin same lerta kaj imagema. Ŝi partoprenas en la usona almozfonduso *Project Linus*, kiu disdonas manfaritajn litkovrilojn al malsanaj aŭ vunditaj infanoj de ilia naskiĝo ĝis 18 jaroj.

Ŝia amika reto jam enhavis 233 personojn tra la tuta mondo la 04.01.2010, sed ĝi certe kreskos tre rapide. Ŝia stilo estas jam vere rimarkinda, se oni konsideras ŝian tiel mallongan praktikadon de la lingvo.

Sur ŝia blogo aperas gazetartikoloj, unue en Esperanto-traduko kaj poste en la originala, la angla. Inter ili estas unu aparte kortuŝa kaj pens-instiga, t.e. la kazo de pendventra porkino (foje nomata ‘vjetnama’), kiu, en Pitsburg, savis la vivon de 61-jara virino de koratako. Tian atakon ŝi jam spertis 17 monatojn antaŭe. La porkino, Bear [ber], tuj perceptis nenormalan situacion, danĝeron, kaj iris sur la straton. Ŝi imagis ruzon: ŝajnigi sin malsana, por haltigi aŭtomobilistojn kaj tiel venigi helpon. Bear revenis de tempo al tempo al la rulhejmo por vidi la evoluon de la situacio kaj reiris sur la straton. Nur post ĉ. 45 min. finfine haltis juna aŭtomobilisto. Bear lerte klopedis komprenigi al li, ke la problemo ne estis en ŝia propra sanstato, sed en la ruldomo. La junulo finfine komprenis la problemon kaj vokis helpservon. La virino estis transportita al hospitalo, el kiu ŝi eliris resanigita, savita.

Henri Masson, Francio

Usono 2. – *La mondo laŭ Monsanto* – La 5-an de januaro ree spekteblis france kaj germane en la TV-kanalo ARTE la enketo de Marie-

¹ Malbone prononcata kiel ‘kits’ (n.d.l.r.)!

Monique Robin pri la usona firmao Monsanto, 18 monatojn post la unua dissendo kaj post la publikigo de ŝia libro *La Mondo laŭ Monsanto – de dioksino al la GMO-oj (genetike modifitaj organismoj), la multnacia entrepreno, kiu deziras fari bonon al vi.*

Temas pri la rezultoj de trijara enketo de Marie-Monique Robin, laŭreatino de la premio Albert-Londres, kiu rekompencas ĉiujare la plej bonan malpli ol 40-jaraĝan reporteron de la skribgazetaro.

Kun ses aliaj usonaj firmaoj Monsanto produktis la tiel nomatan Oranĝan Aganton, t.e. senfoliiga kemiaĵo krime uzata en Vjetnamio, kies loĝantaro suferas ankoraŭ nun pro tio. Tio estis la plej granda kemia milito iam ajn okazinta en la historio de la homaro. Eĉ usonaj soldatoj mortis aŭ suferas ankoraŭ nun pro tio, ke ili ne estis sufiĉe ŝirmataj dum la disŝutado. 40% de la loĝantaro de la usona ŝtato Alabamo, plejmulte nigrula, suferas pro kancero. En 2002 la justico de Alabamo kondamnis Monsanto al pago de 700 milionoj da dolaroj al ĝiaj loĝantoj, pro tio ke ĝi kaŝis la danĝercon de PKB (poliklorbifenilo).

Henri Masson, Francio



Usono 3. – *Esperanto ĉe Android* – Ne multe progresis la nombro da voĉoj – 313 nun kontraŭ 221 la 31-an de decembro 2009 – por ke Esperanto estu rekte uzebla en la programo *Android* de *Google*, kiun ĝi proponas senpage al diversaj markoj de poŝtelefonoj, kio devus certigi al ĝi grandan sukceson. Estas aparte grave por ni, ke Esperanto aperu tie: tio estus utila precedento por samdirektaj klopodoj kaj projektoj ie ajn en la mondo: montri, ke Esperanto estas uzata kaj uzebla.

La verŝajna klarigo por la malmulteco de la voĉdonoj troviĝas en teknika problemo. Venis

al mi atentigoj pri la fakto, ke la steleto, sur kiu oni devas klaki, tute ne ekzistas. Post ekzamenado pri la loko de la ne tre videbla steleto, la problemo solviĝis por kelkaj, sed persistas por iuj. Efektive, mi konstatis, ke la steleto tute ne aperas, se oni malfermas

<http://code.google.com/p/android/issues/detail?id=1730> per Camino, Safari, Opera kaj SeaMonkey (mi ne uzas Internet Explorer de Microsoft kaj sekve scias nenion pri ĝi), sed ĝi aperas nur, kiam oni uzas Firefox.

Mi petas ĉiujn esperantistoj voĉdoni, sed atentu: oni devas registriĝi por voĉdoni. Tio estas simpla formalajo. La blanka steleto situas maldekstre de *Issue 1730: Add Esperanto characters* (Problemo 1730: aldonu Esperantajn karakterojn). Se la steleto ne aperas, provu, uzante la muson, vidi se ie troviĝas nevidebla aktiva zono. Se estas unu, klaku sur ĝi, post kiam vi rigardis la nombron de la voĉoj, por vidi, ĉu ĝi ŝanĝiĝis.

Henri Masson, Francio

Nederlando. – *97-a UK de 2012 en Hanojo* – La elekto de Hanojo kiel la urbo de la 97-a Universala Kongreso de Esperanto en 2012 estis la plej rimarkinda decido de la Estraro de UEA, kiu kunsidis en sia plena konsisto en la Centra Oficejo ekde la 10-a ĝis la 12-a de januaro. Ĝis la lasta momento ankaŭ la korea urbo Busan konkursis pri la rajto okazigi la Kongreson, sed post longa diskuto la estraro decidis favore al la vjetnama ĉefurbo. La Esperanto-movado de Vjetnamio havas jam longan historion, sed la Universalan Kongreson ĝi gastigos por la unua fojo.

La nuna Estraro kunsidos ankoraŭ komence de la ĉi-jara UK en Havano, kie ĝi traktos la lastajn teknikajn detalojn de la kongresa programo. Kutime la plenkunsido en Roterdamo okazas en marto-aprilo, sed ĉi-foje ĝi estis plifruigita kaj okazis tuj post la ceremonio por la publikigo de la festlibro dediĉita al Humphrey Tonkin. La estraranoj devos ankoraŭ trakti kaj decidi pri multaj aferoj rete, ĉar pro la frua kunsidodato ekz. la financaj dokumentoj ne povis jam esti pretaj.

Kiel observanto de TEJO partoprenis la kunsidon la nuna TEJO-volontulo Alexandre Baudry, kiu raportis i.a. pri la baldaŭa apero de la eldono 2010 de la gastigantoj de la Pasporto Servo kaj pri la planata grafika reformo de la revuo “Kontakto”.

(Ret-info, Eventoj, Hungario)

Rakonto: La Sorĉistino (fino)

(Verhaal: De Heks (slot))

Tiam mi kun granda svingo malfermis la fenestreton kaj kune kun Minu saltis sur la herbejon malantaŭ la domo. Triumfante kaj ironie mi pensis pri la grimaco, kiun la avino kaj la patrino faros, kiam ili malfermos la lignotenejon kaj konstatos, ke mi ne plu estas tie. Ili nur serĉu min en la ĉambretaĉo! Ili nur maltrankviliĝu pri mi! Ili nur alarmu la tutan domaron!

Meze de najbara herbejo, kiu apartenis al farmisto Maillard, staris vagono ŝarĝita per fojno. Dum mi kuris al la vagono, la hundo, vidante min, senespere ekbojis, tirante je sia ĉeno. Ĝi kompreneble volis, ke mi kunprenu ĝin, sed tion mi ne povis fari. Tiel rapide kiel mi povis, mi kuris ĝis malantaŭ la vagono, grimpis sur ĝin kaj kaŝis min en la fojno, firme decidinta resti tie, ĝis mia horo alvenos. Tie ĉi ili neniam estis serĉontaj min.

Estis la malfrua posttagmezo. La suno brilis. La bonaodoro de la fojno kaj la kvieteco de la ĉikaŭaĵo agrable ripozigis min post ĉiuj tiuj okazaĵoj, kiuj estis rompintaj min. Tial mi baldaŭ ekdormis.



Mi ne scias, kiom da tempo mi dormis, sed mi memoras, ke mi estis vekita de ia balanciĝado kaj kraketanta bruado. Nur post kelkaj momentoj mi konsciiĝis, ke mi troviĝas sur ruliĝanta vagono! Tre singarde mi levis la kapon super la fojno kaj rigardis. Farmisto Maillard trankvile paŝadis apud siaj du ĉevaloj, de tempo al tempo stimulete ilin per mallonga vorto. Mi ne sciis, kie mi estas kaj kien mi iras, sed mi vidis, ke ni alproksimiĝas al ia arbaro.

Mi povis fari nenion alian ol resti trankvila supre sur la fojno, ne vidate de la farmisto, kiu

certe ne ŝatus transporti pasaĝeron. Kiam ni eniris la arbaron, ĉiuj sonoj de la vagono kaj ĉevaloj estis tuj plulaŭtigataj. Mi devis tuj forlasi la vagonon, sed tio ŝajnis al mi neeble. Post iom da tempo tamen la okazo prezentiĝis al mi. Estis granda kverko, kiu etendis longan horizontalan branĉon trans la tervojo ne tre alte super la fojno. Mi alkroĉiĝis al ĝi, grimpis sur ĝin, lasis pasi la vagonon sub mi kaj descendis de la arbo en kelkaj momentoj.

Sed tuj kiam mi tuŝis la teron, komencis pluvi. Baldaŭ grandaj, malvarmaj gutoj falis tiel dense sur la vojon, herbon kaj arbojn, ke ŝajnis al mi, ke mi rigardas tra kurteno. Mi premis min kontraŭ la trunkon de la kverko por ŝirmi min iomete kontraŭ la pluvegaĉo.

Post kelkaj minutoj la pluvado malpliigis, kaj mi ekiris en la kontraŭa direkto de la vagono. Mi rigardis ĉirkaŭ min kaj vidis nur arbojn: multajn pinojn, sed ankaŭ kverkojn, fagojn kaj betulojn... Sendube tio estis la arbaro Alamé, pri kiu mi tiel ofte aŭdis paroli, sed en kiu mi neniam estis.

Intertempe estis mallumiĝante. Baldaŭ estis fariĝonte nokto. Mi estis malseka kaj malvarma kaj ne konis la vojon hejmen.

La bruo de paŝoj post mi igis min retro-rigardi. Malantaŭ mi venis fremda, alta kaj maldika virino. Nur tial ke ŝi rapide proksimiĝis en mia direkto, ŝi timigis min. Mi volis forkuri, kiam per akra voĉo ŝi kriis:

“Etulo, atendu, mi perdis la vojon. Ĉu vi povas diri al mi, kiel mi povos atingi la centron de la vilaĝo?”

Mi rigardis ŝin atente: ŝi havis longajn, maldikajn manojn kaj longajn, gagate nigrajn, malsekajn kaj malordigitajn harojn.

“Vi devas iri...”

Sed miaj vortoj ne volis plu eliri el mia buŝo. Kiam la virino faris kelkajn pliajn paŝojn en mia direkto, certe por aŭdi min pli bone, mi ekforkuregis tiel rapide, kiel mi povis, kaj mi kuregadis, ĝis kiam mi ekvidis la domon de miaj gepatroj, kiu en tiu momento ŝajnis al mi paradizo. Mia patro, kiu ĝuste tiam revenis de sia laboro, ricevis min inter siaj brakoj. Mi estis tute senspira kaj anhelegadis, kvazaŭ la morto mem estus persekutinta min.

“De kie vi venis je tiu ĉi malfrua horo, filo?” li trankvile demandis.

“De tie...” mi respondis inter du anhelegoj, indikante la vojeton, kiun mi ĵus forlasis.

“Ĉu la arbaro Alamé?”

“Jes.”

“Kaj kion vi faris tie?”

Mi suprentiris la ŝultrojn anstataŭ respondi. Mi ne povis, ne kuraĝis rakonti al li mian tutan aventuron. La patro rigardis min kun pli da atento.

“Sed kial vi tremas tiamaniere, Albert? Ĉu vi terurigiĝis?”

Mi kapjesis.

“Pro kio aŭ kiu?”

“Pro Babouse, la sorĉistino. Mi renkontis ŝin en la arbaro.”

“Ĉu vu hazarde malbone kondukis hejme?”

“...”

“Ĉu?”

“Mi blasfemis.”

“Ho! Vi blasfemis. Tio estas grava afero.”

Dum mi lasis flui la larmojn sur miaj vangoj, mi singultante rakontis ĉion okazintan, limigante mian kontribuon kiel eble plej.

“Sed kial vi blasfemas? Mi ne blasfemas, nek la patrino, nek la geavoj.”

Mi aŭdis Morel blasfemi.”

“Bona kristano ne faras tion, Albert.”

“Ĉu Morel estas malbona kristano?”

“Morel estas bonkora viro, sed li ne povas regi sin. Tio ne estas bona.”

“Sed li estas mia amiko.”



“Mi scias. Sed kiam vi ree vizitos lin, diru al li, ke vi ne plu venos, se li ankoraŭ blasfemos, ĉar vi ne ŝatas tion.”

“Ĉu vi kredas, ke li akceptos tion?”

“Mi estas certa.”

“Mi ne plu blasfemos, patro.”

“Tio faras plezuron al mi.”

Intertempe ni atingis la domon.

“Fripono!” insultis min mia patrino. “Ni ĉie serĉis vin? Kie vi estis?”

“Li estis en la arbaro Alamé kaj renkontis sinjorinon Babouse, la sorĉistinon.”

“Sinjorinon Babouse?” samtempe ekkriis ambaŭ virinoj, mirigitaj.

“Jes,” mi certigis ilin tre grave. “Ŝi aspektas terura.”

“Kaj vi terurigiĝis?”

Jes, ŝi etendis la manojn al mi por kapti min, sed mi eskapis,” mi mensogis.

Ambaŭ virinoj ekrigardis sin.

“Vi ja vidas, kio okazas, kiam vi blasfemas,” diris la patrino.

“Mi neniam plu blasfemos, neniam plu! Mi promesas.”

“Mi esperas, ke vi plenumos vian promeson,” diris la patrino. “Iru nun al via ĉambro kaj surmetu sekajn vestaĵojn, ĉar vi estas trempita kiel dronigita kato. Post tio vi venos manĝi. La manĝo ja estas jam malvarma.”

La sekvantan tagon atendis min malagrabra surprizo en la lernejo. Nia kutima instruistino, fraŭlino Davost, forestis, kaj antaŭ la klaso staris... Babouse. Mia koro ekbategis pro timo. Kio estis okazanta? Mi ne komprenis kaj volis forkuri, sed mi ne kuraĝis, ĉar la aliaj infanoj kondukis perfekte normale.

Post la preĝo Babouse donis al ni signon per la mano, ke ni povas sidiĝi, kaj diris:

“Mi nomiĝas fraŭlino Cassal. Mi estos via instruistino dum kelka tempo, ĉar fraŭlino Davost estas malsana. Ĉu iu el vi havas demandon?”

Ŝi mensogas, mi diris al mi mem. Fraŭlino Davost ne estas malsana. Ŝi estas ekhavonta bebon. Mi certe sciis tion, ĉar mi sekrete subaŭskultis konversacion inter la patrino kaj la avino. Cetere, estis kutimo ĉe ni ĉiam nomi instruistinon fraŭlino, eĉ se ŝi estis edziniĝinta.

Iu lernanto levis fingron kaj demandis:

“Ĉu fraŭlino Davost forestos longe?”

“Jes, almenaŭ monaton. Ankoraŭ ia demando?”

Alia demandis:

“Ĉu fraŭlino Davost revenos, tuj kiam ŝi estos resaniĝinta?”

“Kompreneble, ŝi revenos. Ankoraŭ iu?”

Mi kolektis mian kuraĝon kaj levis fingron:

“Jes?”

“Ĉu vi loĝas en la arbaro Alamé?”

Ŝi ekridetis.

“Ĉu tio estas la arbaro, en kiu ni renkontiĝis hieraŭ?”

Ĉiuj infanoj turnis sin al mi kaj rigardis min mirigite, eĉ ĵaluze.

“Jes, fraŭlino.”

“Mi ne loĝas en arbaro. Kia stranga penso! Tie loĝas nur birdoj kaj bestetoj. Mi loĝas en via vilaĝo por la daŭro de la malsano de fraŭlino Davost. Ankoraŭ ia demando?”

Neniu reagis.

“Tiam ni vidu, kion vi jam scias pri aritmetiko,” ŝi diris.

Kaj ŝi komencis la instruadon.

Mi estis trankviligita. Tiu virino certe ne estis Babouse, kvankam ŝi eble similas al ŝi. Kiel stulta estis mia timo! Mi decidis kredi mian amikon Morel, kiu asertis, ke tute ne ekzistas sorĉistinoj, sed ankaŭ peti lin ne plu blasfemi... (Trad. P.J. Doumen)

La Limburga Esperanto-Asocio

(*De Limburgse Esperantovereniging*)

Aktivaĵoj en januaro kaj februaro 2010:

Ĵaŭdon, la 28-an de januaro 2010:

Prelego pri *la Antikvaj Belgoj* far Pieter Jan Doumen. La ĉefoj fontaj de niaj sciaj pri ili estas unuflanke la *Komentarioj pri la Gaŭla Milito* de Julio Cezaro kaj aliflanke la multaj arĥeologiaj trovaĵoj en niaj regionoj. Ŝajne la belgoj en la tempo de Julio Cezaro ne estis tiel primitivaj kiel oni pensis antaŭe.

Ĵaŭdon, la 25-an de februaro 2010:

Tre interesa prelego de Marcel Delforge, prezidanto de la valona *Association pour l'Espéranto* pri la historio de Esperanto en Belgio. En junio 1893 iu S-ro Dethier, volapukisto kaj prezidanto de lieĝa filatelista asocio, legis artikolon pri Esperanto de la mano de la Louis de Beaufront. Dethier tuj ekstudis Esperanton, fariĝis esperantisto kaj reklamis la lingvon en sia propra revuo. Tio okazis kvar jarojn antaŭ la alveno de Charles Lemaire, la ĉampiono de Esperanto en Belgio. Ni intencas publikigi estontece tiun tre interesan historion en nia revueto.

Aktivaĵoj en marto kaj aprilo 2010:

Ĵaŭdon, la 25-an de marto 2010:



Kantovespero. Ĉiuj membroj estas petitaj kunporti sian kantan de LEA, *Ni kantu kune*. Se vi ankoraŭ ne havas ĝin, ĝi estas havebla surloke por € 5,00. La vesperon gvidos Pieter Jan Doumen, kiu akompanos la kunkantadon sur sintezilo. Paul Hotterbeekx, gitaristo kaj kantisto, kantas kelkajn kantojn en Esperanto, kiujn li mem verkis. Ne maltrafu tiun agrablan, etosplenan vesperon! Loko: nia kutima lokalo en “t Poorthuis”, Peer (fronte al la ĉefa enirejo de la preĝejo).

Ĵaŭdon, la 30-an de aprilo 2010: Rob de Kete-laar, parolados pri Esperantaj proverboj.

Ĉiu ricevanto de 'La Ponto' rajtas plusendi nian revuon. Ni nur petas lin sciigu al ni, kiom da ekzempleroj li disdonas. La nombro de la ricevantoj gravas por la sponsoroj, kiuj permesas al ni fari kaj distribui ĝin senpage.

Pri la vulpo Renardo

Tiu ĉi bestepopeo rilatas al unu el la branĉoj de la *Roman de Renart*, verkita de la franco Pierre de Saint-Cloud, sed estis ellaborita en tre persona maniero kaj situigita en regiono, en kiu oni facile rekonas parton de la lando Vaso, oriente de Gento. La poemo povus ankoraŭ aparteni al la 12-a jarcento. La unua verso nomas kiel poeton “Willem

die Madocke maecte”, pri kiu ni scias nenion. Multaj pridubas, ke li estus la sola poeto, des pli ke en la manuskripto aperas dua nomo, Aernout, kiu mortis antaŭ ol fini la verkon. La aventuroj de Renardo restis popularaj en nia lingvo, en kiu aperis multaj prilaborajoj, i.a. *Reinaerts Historie* (ĉ. 1375), en kiu la rakonto estas plivastigita, kaj proza versio (presita en 1479). En la moderna tempo ni mencias i.a. la versioj de J.F. Willems, J. de Geyter, Prudens van Duyse, Stijn Streuvels, H.Melis, E. Vetemans, Paul de Mont kaj E. Bosschaerts. Ĝi estis ankaŭ ofte tradukita en aliajn lingvojn. (*El “De Bron”, Nederlandse Bloemlezing en Literatuurgeschiedenis, 5-de deel, eldono de 1960*) (Trad. P.J. Doumen)



La Esperanta versio en 4.450 regulritmaj versoj sub la titolo *Renardo Vulpo*, ĉiam estas havebla ĉe FEL kaj UEA . Prezo € 15, 00 plus sendokostoj. Tre leginda kaj legebla libro!

Lingvo kaj naturo

(*Taal en natuur*)

Rakonto de la fama rusa aŭtoro Konstantin Paŭstovski, tradukita en Esperanton de Olga Goriĉenko el Murmansko, Rusio.

Mi estas certa, ke por plena poseda de la rusa lingvo, por ne perdi la senton de tiu lingvo, oni bezonas ne nur konstantan komunikadon kun simplaj rusaj homoj, sed ankaŭ komunikadon kun paŝtejoj, arbaroj, akvoj, maljunaj salikoj,

kun birda fajfado kaj kun ĉiuj floroj, kiuj kapoklinas el sub arbusto de avelo.

Evidente al ĉiu homo okazas sia feliĉa tempo por malkovroj. Okazis ankaŭ al mi simila somero de malkovroj en arbara kaj herbeja parto de meza Rusio – somero abunda je fulmotondroj kaj ĉielarkoj.

La somero pasis en rumoro de pinaj arbaroj, kun gruaj krioj, kun blankaj, grandegaj kumuluso, kun ludo de nokta ĉielo, en netraireblaj odorantaj veproj de ulmario, kun batalemaj virkokaj kriegoj kaj knabinaj kantoj sur krepuskaj herbejoj, kiam sunsubiro orumas knabinajn okulojn kaj la unua nebulo diskrete fumiĝas super vorticoj.

Dum tiu somero mi eksciis denove – per palpado, per gustado, per odorado – multajn vortojn, kiuj estis, kvankam konataj al mi, foraj kaj netravivitaj. Pli frue ili elvokis nur ian magran bildon. Sed nun evidentiĝis, ke en ĉiu vorto sin kaŝas abundo da vivecaj bildoj.

Mi certe scias, ke estas pluvoj etgutaj, blindaj, longdaŭraj, fungaj, urĝaj, pluvoj okazantaj per strioj – do striaj, oblikvaj, fortaj pluvoj, kaj fine pluvegoj.

Tamen estas unu afero – scii tion spekulative, sed tute alia afero – sperti tiujn pluvojn per si mem kaj kompreni, ke ĉiu el ili havas sian poezion, siajn signojn, distingajn de la signoj de aliaj pluvoj.

Tiam ĉiuj ĉi vortoj difinantaj la pluvojn reviviĝas, pleniĝas per elokventa forto. Tiam post ĉiu vorto oni vidas kaj sentas tion, pri kio oni parolas, sed kion oni ne prononcas aŭtomate, kiel kutime.

Kun pluvo estas ligitaj multaj antaŭsignoj. La suno malleviĝas inter la nuboj, fumo premiĝas al la tero, hirundoj flugas malsupre, virkokoj kriegas en la kortoj, neglektante la tempon, nuboj etendiĝas en la ĉielo en longaj, nebulaj bukloj – ĉio ĉi estas antaŭsignoj de pluvo.

Kaj longe antaŭ la pluvo, kvankam ankoraŭ ne akumuliĝis nubegoj, sentiĝas fajna spirado de humido, kiu verŝajne venas de tie, kie pluvoj jam okazis.

Sed jen komencas guti la unuaj gutoj. La popola vorto “makuleti” bone transdonas la aperon de pluvo, kiam ankoraŭ maloftaj gutoj lasas malhelajn makuletojn sur polvaj vojoj kaj tegmentoj. Poste la pluvo plifortiĝas, kaj tiam aperas mirinda malvarmeta odoro de tero, ĵus malsekigita per la pluvo. Ĝi estas nelongdaŭra, ĝin sekvas la odoro de malseka herbo, precipe de urtiko.

Estas karakterize, ke, sendepende de tio, kia estas la pluvo, tuj post kiam ĝi komenciĝas, oni ĉiam nomas ĝin tre tenere – pluveto. “Pluveto estas antaŭ la starto”, “pluveto pliiĝas”, “pluveto lavas la herbon”.

Ni analizu kelkajn specojn de pluvo por kompreni, kiel reviviĝas la vorto, kiam kun ĝi estas ligitaj senperaj impresoj, kaj kiel tio helpas al verkisto senerare uzi ĝin. Ekzemple, per kio distingiĝas urĝa pluvo de tiu funga?



La vorto “urĝa” signifas “rapida”. Urĝa pluvo fluas vertikale, forte. Ĝi ĉiam alproksimiĝas kun alkuranta bruo.

Aparte bona estas urĝa pluvo super rivero. Ĉiuj ĝiaj gutoj elbatas en la akvo rondan kave-ton, etan akvan kalikon, suprensaltas, denove falas kaj kelkmomente antaŭ ol malaperi estas ankoraŭ videbla en la fundo de la akva kaliko. La guto brilas kaj similas al perlo.

Kaj dume sur la tuta rivero estas aŭdata vitra sonoro. Laŭ la tonalteco de la sonoro oni konjektas, ĉu la pluvo pliiĝas aŭ malpliiĝas.

Sed subtila funga pluvo dormeme “ŝutiĝas” el malsupraj nubegoj. La flakoj de tiu pluvo ĉiam estas varmaj. Ĝi ne sonoras, sed flustras ion dormigan kaj apenaŭ rimarkeble moviĝas inter arbustoj, kvazaŭ ĝi tuŝus per mola piedeto jen unu folion, jen alian. *(Daŭrigota)*